

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 18. Marto 23, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Progresas la israela kongreso

Ĝis nun aliĝis al la Israela Kongreso en Tiberiado ĉ. 35 personoj, el ili 14 eksterlandanoj. La kongreso okazos dum tri tagoj, la 13-an ĝis la 16-a de aprilo. kun riĉa ekskursiva, arta kaj kleriga programo. Inter la 16-a kaj la 21-a de aprilo okazos postkongresa ekskurso tra Israelo kaj Jordanio.

Aldone estas la plena programo kaj pliaj informoj. Estontaj eventualaj ĝisdatigoj aperos en la IK-retejo, <http://esperanto.org.il/ik23.html>, kie estas ankaŭ reta aliĝilo. Daŭre eblas aliĝi surbaze de liberaj lokoj en la kongresa hotelo. Por eksterlandaj partoprenantoj loko en dulita ĉambro kostas po 300 eŭrojn persono inkluzive du ekskursojn kaj programon.

Amri Wandel

Kurso en la Eŭropa ĉefurbo

De: edukado.net <redaktanto@edukado.net>

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Nomo: Eo-kurso por komencantoj

Gvidantonomo: Adamo Brooking

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Bruselo, Belgio

Aldoninto: Nikolao

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27521>

Rezultoj el AMO 99

Mi volus mallonge informi vin pri la faka internacia seminario „Eŭropaj fervojoj: daŭripova fervojtransporto“ organizita de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio Universitato Pardubice kaj IFEF la 6-a de marto 2023 en la Universitato Pardubice (CZ).

Inter la Intervenintoj estis:

Rodica Todor (RO): Projekto VERDEN.

Vito Tornillo (IT): Kombinovaná doprava.

Lars Sözüer (DE/CH): Biciklado

Roman Štěrba (CZ): Správa železnic, s.o. a strategie udržitelnosti.



Trovu informojn ĉe:

[\(ĈeFEA-Ĉeĥa fervojista Esperanto asocio r.a. ČŽES-Český železničářský esperantský svaz z.s. | ——— Landa asocio de IFEF ——— Internacia fervojista Esperanto federacio \(wz.cz\),](#)

Entute 5 fakajn prelegojn tradukitajn el / en esperanto, aŭskultis 70 partoprenantoj (ĉeeste 36, rete 34), el 11 landoj – CZ, BE, IT, FR, DE, HR, RO, SK, PL, DK, HU + kelkaj aliaj ne identigitaj.



Ĝojiga estas la partopreno ne-esperantistoj - 14 gestudentoj, 8 gekolegoj el Universitato kaj ankaŭ aliaj 6 fakuloj el diversaj firmaoj. La bulteno de IFEF raportas, ke al la kunsido venis raportoj el Entute venis dek kontribuajfoĵoj – el Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Danio, Francio, Germanio, Kroatio, Italio, Serbio, Svedio, kaj eĉ kelkaj rimarkoj el Barato.

Martuska Jaroslav

Brazila bukedo

Certe vi jam iom aŭdis pri AI - Artefarita Intelektto, verŝajne la plej nova grandega paŝo de la komputika teknologio. Pere de ĝi la maŝinoj respondas kvazaŭ per si mem, instruas ion ajn, faras kalkulojn kaj eĉ kreas tekstojn, bildojn, sonojn...

Brazila Kolekto estas ĉiam atenta al tiaj novaĵoj, kiam ili povas utili al nia misio propagandi Esperanton per brazila muziko.

Ekzemple, al la bela faduo verkita de **Chico Buarque**, nome *Tropika faduo*, La kanto temas pri la praportugala revo fari el Brazilo kolonian imperion. Ĝin tradukis **Flávio Fonseca**.

Alia bildo kreita de AI estas la fluganta gitaristo, ĉe la kanto *Birdiĝo*, verkita de **Luiz Carlos Sá** kaj **Guarabyra**, esperantigita de **Vicente Sales**. Krome, li tradukis dufoje, kaj ambaŭ versioj troveblas en Brazila Kolekto.

Por kompletigila semajnon, en la retejo aperis video registrita de **Eveline Paŭla**, de la instrua porinfana kanto *Alfabeta muziko*, de nekonata aŭtoro.

Ĉu iu AI kreis alian enhavon de Brazila Kolekto? Ne! En la esploraj provoj oni konstatis ke tiuj “robotoj” eĉ sukcesas traduki tekstojn al Esperanto, tamen ne kapablas obei metrikon, prozodion kaj tiajn poeziajn aferojn. Certe la arto estas nepre homa!

La Scienca kalendaro revenas

La Lerneja Scienca Kalendaro 2023, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), ĉi-jare denove havas version en Esperanto, post la sukceso de la pasinta 2022. La kalendaro enhavas kolekton de eventoj aŭ datrevenoj ligitaj al scienco (en ampleksa senco) por ĉiu tago de la jaro, kun speciala atento al la diverseco de la ĉefroluloj.

Vi povas ĝin trovi, elŝuti kaj printi en pluraj versioj el:

<https://digital.csic.es/handle/10261/285166>.

Kiel en la pasinta jaro, la kalendaron akompanas Didaktika Gvidilo, por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj, kaj ankaŭ versio en facila lingvo por utiligo fare de pli maljunaj lernantoj aŭ homoj kun malfacilaĵoj por legado.

Krom en Esperanto, la kalendaro ekzistas en versioj en la hispana, galega, astura, kataluna, aragona, eŭska, angla, franca, portugala, araba, kaj ĉi-jare unuafoje ankaŭ en la persa (farsia) lingvoj.

Pri la tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio. Mencio al Esperanto kaj agnosko al la kunlaboro de HEF aperas en la oficiala prezento fare de la CSIC, kaj en ties gazetara komuniko. Krome, la kalendaro en Esperanto havas propran tviteran konton, kiu ĉiutage publikigas la koncernajn datrevenojn.

Instruista trejnado denove en Poznano, Pollando



Titolo: La lasta Instruista Trejnado en Poznano
Kategorio: Laste ĉe edukado:
La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano,

Pollando) Edukado.net kaj ILEI denove organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la necesajn konojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kurso komenciĝos en septembro 2023 per ĉeesta sesio. La aliaj sesioj okazos en Zoom kaj per reta laboro en edukado.net.

Legu la detalajn informojn kaj ne mistrafu la lastan okazon trejniĝi kadre de la universitataj studoj en Poznano, eĉ se nur kun movada diplomo. En la bildo studentoj kun diplomoj el 2017.

Ekspozicio Esperanta en Fuenlabrado

Dum la tuta monato marto eblos viziti en Fuenlabrado (en la Madrida regiono) la ekspozicion "Esperanto, lingvo kaj kulturo". La loko estas la centro por instruado de plenkreskuloj, CEPA Paulo Freire, en la strato Creta numer. 2 (proksime al la metro- kaj trajn-stacio "Fuenlabrada Central"), malfermita de 9.30 ĝis 21.00 h, lunde ĝis vendrede.

La ekspozicio estis inaŭgurita la 2-an de marto per prelego titolita "Esperanto. Ekolingvismo" kaj estos malfermita ĝis la 31-a de marto. Apude alia hispana afiŝo por konigi nian lingvon.

El Bitbulteno de HEF, n-ro 68



Kurso en la ĉefurbo de Slovenio

De: edukado.net <redaktanto@edukado.net>

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Ni kuras la unuan rondon

Gvidantonomo: Marjana Komprej

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Ljubljana, Slovenio.

Aldoninto: ostoj

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27522>

===== vortoj: 945 =====



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj en Italio, Hungario kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.